G R A M A T

S M A L I K

V O L A P Ü K A

medü pük Esperanto

Pakobüköl fa Brian R. Bishop

M A L G R A N D A

G R A M A T I K O

D E V O L A P U K O

per Esperanto

Kompilis Brian R. Bishop

A. GRAMATIKO	B. UTILAJ VORTEROJ KAJ VORTGRUPOJ
i. Antaŭparoloj	
ii. Enkonduko	
iii. Mallonga historio de Volapuko	1. Prefiksoj
1. Alfabeto	2. Sufiksoj
2. Artikolo	3 Ĉefaj radikformaj adverboj
3. Substantivoj	4. Ĉefaj radikformaj prepozicioj
4. Adjektivoj	5. Ĉefaj radikformaj konjunkcioj
5. Numeraloj	6. Ĉefaj radikformaj interjekcioj
6. Pronomoj	7. Kelkaj vortgrupoj
7. Adverboj	
8. Prepozicioj	
9. Konjunkcioj	
10. Interjekcioj	
11. Verboj	
12. Volapuko kaj Esperanto	

© Brian R. Bishop 2015.

(i) ANTAŬPAROLO (*Fonun*)

Indas, je la jarcenta jubileo de Volapuko, ke la Esperantistaro disponu informojn pri tiu lingvo, kiu la unua montris la efektiviĝeblon de monda lingvo.

Iamaj konkurantoj por la sama rolo, Volapuko kaj Esperanto nun estas konkurantoj en diversaj roloj: antaŭa *Cifal* [Ĉefestro] Johann Schmidt skribis, "*Vilobs kälön püki at leigoso äsä käloy vöno-Grikänapüki u vöno-saxadapüki*" [Ni devas zorgi pri Volapuko tiel, kiel oni zorgas pri la antikva greka aŭ antikva saksa lingvoj]. Estas nia devo konservi ĉi tiun parton de la homa lingva heredaĵo.

Nun, for de la frujaraj akraj kritikoj, oni povas eltrovi por si mem tion, kio altiris siatempe tiom da subtenantoj. Oni malkovras, kie la tiom sukceshavanta antaŭiranto de Esperanto vere havas en si siajn proprajn belecon, simplecon kaj racion.

Tial, en la venonta jarcentfesto de la invento de Volapuko, la 31-an de marto, 1979, ni povas laŭte aserti, kiel Zamenhof ĉe Boulogne, "Ni esprimas nian koran dankon al sinjoro Schleyer, la unua kaj plej energia pioniro de la ideo de neŭtrala lingvo internacia".

Brian R. Bishop,
Leigh-on-Sea,
Novembro, 1978.

ANTAŬPAROLO AL DUA ELDONO (KOREKTITA)
(*Fonun dabükota telid (pekoräköl*))

Post kiam mi manskribis ĉi-tiun verketon, la ebleco kreii kaj komunikadi per Volapuko precipe per la interreto kreskiĝas. Sed la pligranda parto de la agoj estas, bedaŭrinde, per la angla. Ĉi-tie ne taŭgas amplekse klarigi, kiel la angla influas malhelpe la pensmanierojn, kreadformojn kaj vortuzadon en neanglaj lingvoj, precize kaj precipe en Volapuko.

Krome pli kaj pli da Esperantistoj interesiĝas kaj esploras kiel kaj kial la prototipo de Esperanto tiom sukcesas en formo kaj uzo.

La unua eldono de ĉi-tiu verketo enhavis mallongan vortaron. Post tiam, tamen, André Cherpillod eldonis sian vortaron (*Vortaro Volapük-Esperanto kaj Esperanto-Volapük / Vödabuk Volapük-Sperantapük e Sperantapük-Volapük*, Eldonejo La Blanchetière, 2003, ISBN 2-906134-63-5) multe pli utilan kaj ampleksan. Mi do ellasis ĝin en ĉi-tiu okazo sed enmetis kelkajn vortlistojn. Mi tre dankas Hermann Phillips pro sugestoj kaj korektaĵoj al ĉi tiu dua (korektita) eldono.

Brian R. Bishop,
Leigh-on-Sea,
Marto, 2015.

(ii) ENKONDUKO (*Nüdug*)

La sekvantaj paĝoj sufiĉos por taksi Volapukon. La lingva normo estas laŭ la nemalhaveblaj, definitivaj verkoj de D-ro Arie de Jong, *Gramat Volapüka* kaj *Wörterbuch der Weltsprache*, kiuj donos plenan konon.

Pri la gramatiko, mi ne povas ne kunsenti kun Zamenhof (*Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia* en *Fundamenta krestomatio*, 17-a eldono, paĝo 290): "… malgraŭ diversaj eraroj la gramatiko de Volapük estas tiel facila kaj tiel simpla, ke doni ion multe pli facilan kaj simplan oni jam ne povas …"

Tamen, Zamenhof plie skribas, "Dume Volapük solvis nur la demandon de la gramatiko, kaj la vortaron ĝi lasis tute sen atento, doninte simple tutan kolekton de diversaj elpensitaj vortoj ". Mi opinias, ke li pensis tiel maljuste ĉar li ne taksis la funkcion de la afiksoj kaj la riĉecon de la gramatikajn formojn, kiujn mi apartigis[, kaj ĝian radikan flekeblecon]. Cherpillod, en sia vortaro menciita montris la logikon de la volapuka vortaro, kiun li aranĝis laŭ radikoj, normala sistemo ĉe Esperanto (ekzemple *P.I.V.*).

Nun estas bezonataj, por starigi definitive la lingvon je la dispono de la estonteco, pli granda vortaro Esperanto-Volapük/Volapük-Esperanto kiaj ekzemplaro de vortuzoj el la literaturo, eble ankaŭ ekzercaro aŭ lernolibro, krom la reeldonado de la malnova literaturo kaj la eldonado de novaj verkoj. [Tio eĉ nun komenciĝas en la interreto.]

(iii) MALLONGA HISTORIO DE VOLAPUKO
(*Jenotem brefik Volapüka*)

Dum Zamenhof ankoraŭ perfektigis siajn ideojn pri Esperanto, Johann Martin Schleyer germana sacerdoto, la 31-an de marto, 1879, finpensis la principojn de sia lingvo, kiun li nomis *Volapük*, t.e. monda lingvo. Du monatojn poste li publikigis la skizon en gazeto, kaj tiam, en 1880, sep jarojn antaŭ la *Una libro de Esperanto*, li eldonis sian unan gramatikon kaj vortareton.

Tuj la literaturo kaj movado de Volapuko kreskiĝis, ĝis, en 1889, tra la tuta civilizita mondo, eĉ en Japanujo, Ĉinujo kaj centra Afriko, ekzistis almenaŭ unu miliono da membroj (laŭ taksado de kritikuloj), pli ol 250 kluboj, pli ol 50 revuoj, kaj pli ol 500 eldonaĵoj. Jam du vaporŝipoj sur la rivero Rhein portis la noman *Volapük*. Ĉio ŝajnis preta por la plena akcepto de la lingvo ĉie.

Tamen tiun saman jaron ekkomenciĝis misfortunoj: personeca kaj organiza kvereloj inter la kluboj en München kaj Nürnberg elradiiĝis tra tuta Germanujo kaj Eŭropo. Membroj foriris; malamikoj atakis. La malfortiĝo daŭris en la 20-an jarcenton. Schleyer mem mortis en 1912 okdekunjara.

Tiam, en 1931, Volapuko akiris novan vivon per la jam menciitaj gramatiko kaj vortaro de D-ro Arie de Jong. Dum la fruaj jaroj, kelkaj ĉefoj en la volapuka movado kaj eĉ Schleyer mem sugestis kelkajn malgravajn ŝanĝojn por eĉ pli faciligi la lingvon. D-ro Arie de Jong en 1931 kunmetis la plej utilajn proponojn kaj tiel stabiligis kaj definitivigis Volapukon. La revuo *Volapükagased pro Nedänapükans* daŭris multajn jarojn kiel la tutmonda organo.

Post la centjara datreveno de Volapuko en 1979, komenciĝis nova organo *Vög Volapüka,* kaj stariĝis la *Zänabür Volapüka* [Volapuka Centro] [kies ĉiuj posedaĵoj nun estas en la biblioteko de la *Esperanto Asocio de Britio*].

Ĉie kreskiĝas intereso pri Volapuko, kaj daŭre restas malgranda koresponda reto en pluraj landoj. [Post kiam ĉi-tiuj vortoj estas skribitaj, la intereso kaj korespondaĵaro multfoje kreskiĝas, precipe per la interreto. Vidu, ekzemple, inter multaj retpaĝoj:
http://volapuk.evertype.com/
http://personal.southern.edu/~caviness/Volapuk/
http://www.archive.org/search.php?query=Volapük
http://en.wikipedia.org/wiki/Volapük]

A.1. ALFABETO [*Lafab*]

1.1. Literoj (*tonats*): *a, ä, b, d, e, f, g, h, i, j, k, l, m, n, o, ö, p, r, s, t, u, ü, v, x, y, z.*
La sono ne ŝanĝiĝas pro siaj kunliteroj. Estas kelkaj etaj flekseblecoj por respekti nacilingvajn kutimojn.

1.2. Vokaloj (*vokats*) (prononco)
a, e, i, o, u: same, kiel in Esperanto, itala, hispana, germana.
ä: kiel germana ä (Bär), franca è (mère); preskaŭ kiel esperanta ej (plej).
ö: kiel germana ö (schön), franca eu (peur); angla neŭtra sed longa e, u (absurd).
ü: kiel germana ü (Tür), franca u (plu).
Estas nek diftongoj nek triftongoj (du aŭ tri vokaloj prononcitaj kune): oni parolas ĉiun vokalon aparte, ekzemple *rein* [pluvo] = *re-in.*

1.3. Konsonantoj (*konsonats*) (prononco)
c: kiel esperanta ĉ aŭ ĝ; *j*: kiel esperanta ŝ aŭ ĵ; *x*: kiel esperanta ks;
y: kiel esperanta j; *z*: kiel esperanta ds aŭ c.
La aliaj: kiel la samaj literoj en Esperanto.

1.4. Akcento (*kazet*)
La akcento staras sur la lasta silabo, ekzemple *lafáb* [alfabeto], *lafabík* [alfabeta].

A.2. ARTIKOLO [*Lartig*]

2.1. Volapuko havas nek difinan nek nedifinan artikolon.
Tiel *fat* signifas ‘patro’ aŭ ‘la patro’.

2.2. La artikolo *el* estas uzita antaŭ nedeklinacieblaj (ekzemple ekstervolapukaj) substantivoj, precipe ĉe oblikvaj kazoj, ekzemple:
(el) Schleyer = Schleyer; *ela Schleyer* = de Schleyer;
ele Schleyer = al Schleyer *eli Schleyer* = Schleyer-on
o (el) Schleyer! = ho Schleyer!.

2.3. *El* ankaŭ provizas radikon por afiksoj laŭbezone antaŭ tiaj vortoj:
vidu ekzemple afkiksojn, kiel *hi-, ji-,-ak, -an, -af, -äd, -än, -ed, -el, -ep, -eä.*
Ekzemploj: *Elak Bodensee* (*-ak* por lagoj) ; *eled* (*-ed* por montoj) *Pennines; Zamenhof äbinom hielan nemü Esperanto* [Zamenhof estis homo nomita Esperanto].

2.4. Se oni uzas specifantan vortoj, oni ne uzas la artikolon, ekzemple:
zif London [la urbo London]*; o jireg Elizabeth!* [ho reĝino Elizabeth!].

2.5. La artikolo ne estas uzita kun volapukaj vortoj, ekcepte se on volas fari el ili nedeklinaciiĝotan titolon, ekzemple:
Labob eli ‘Vödabuk Volapüka’ [Mi havas la (libron) ‘Vödabuk Volapüka’]

A.3. SUBSTANTIVOJ [*Subsats*]

La radiko de ĉiu adjektivo kaj verbo estas substantivo, kies radiko tial ĉiam komenciĝas kaj finiĝas per konsonanto.

3.1. Kazoj [*deklinafoms*]

	Singularo [*balnum*]		Pluralo [*plunum*]
fat	= (la) patro	*fats*	= (la) patroj
fata	= de (la) patro	*fatas*	= de (la) patroj
fate	= al (la) patro	*fates*	= al (la) patroj
fati	= (la) patron	*fatis*	= (la) patrojn
o fat	= ho patro	*o fats*	= ho patroj.

3.2. Genroj (*gens*]

Vortoj, kiuj signifas ideojn virajn estas viraj, kaj tiuj, kiuj signifas inajn estas inaj. Ĉiuj aliaj vortoj estas komunaj.

viraj:	*man* [viro],	*fat* [patro],	*tor* [virbovo].
inaj:	*vom* [virino],	*mot* [patrino],	*kun* [bovino].
komunaj:	*men* [homo],	*flen* [amiko],	*cil* [infano],
	jevod [ĉevalo], :	*bub* [bovo],	*bovül* [bovido],
	gok [koko],	*buk* [libro],	*tab* [tablo].

Komunaj substantivoj, kiuj rilatas al viraj estaĵoj, povas ŝanĝiĝi al viraj per la prefikso *hi-*, kaj al inaj per la prefikso *ji-*, ekzemple:

flen [amiko],	*hiflen* [viramiko],	*jiflen* [amikino],
dog [hundo],	*hidog* [virhundo],	*jidog* [hundino].

3.3. Diminutivoj (*smalükamavöds*)

flor floro	*floril* [floreto]	*dom* [domo]	*domil* [dometo]

3.4. Kunigitaj vortoj (*kobükamavöds*]

Oni povas kunigi substantivojn pere de la genitivo aŭ akuzativo. Oni ĝenerale uzas la genitivon (ekz. *Volapük* = de la mondo lingvo = monda lingvo).
Se la unua vorto estas kvazaŭ objekto de la dua, oni uzas la akuzativon (ekz. *pükitidan* = lingvo-n-instru-isto).
Do, estas diferenco inter *motalöf* [amo de patrino] kaj *motilöf* [amo al patrino].

Estas neniu liga vokalo se la unua vorto ne estas substantivo, ekz.:
se estas nombro (*foldil* [kvara parto, kvar-ono]),
se estas prepozicio (ekz. *lügol* [al-iro]), aŭ
se estas konjunkcio (ekz. *pluuneplu* [pli-aŭ-malpli]).

A.4. ADJEKTIVOJ (*Ladyeks*)

4.1. La adjektivo ĉiam finiĝas per *–ik*, kaj povas esti farita el aliaj gramatikaj formoj, krom puraj afiksoj, jene:

gud [bono] *gudik* [bona] *ta* [kontraŭ] *taik* [kontraŭa]
löfön [ami] *löfik* [am(at)a] *si* [jes] *siik* [pozitiva]
Volapük [Mondlingvo] *Volapükik* [mondlingva/volapuka].

4.2. La adjektivo ne ŝanĝiĝas, kiam, kiel normale, ĝi staras tuj post la substantivo aŭ alia adjektivo pri la sama substantivo; sed ĝi ŝanĝiĝas laŭ nombro kaj kazo, kiam ĝi antaŭiras la substantivon, aŭ kiam troviĝas aliaj vortoj inter la substantivo kaj ĝia adjektivo, aŭ kiam ĝi staras sola, aŭ kiam ĝi rilatas al pli ol unu substantivo, ekz.:
buk jönik [bela libro]
bukas jönik = jönikas bukas [de la belaj libroj]
bukas dub köls mödik jönikas [de libroj, pro multaj koloroj, belaj]
labob bukis tel: logolös gretiki [mi havas du librojn: rigardu la grandan]
labob buki e gasedi jönikis [mi havas libron kaj revuon belajn].

4.3. De adjektivo oni formas substantivon pri persono aŭ abstakteco per sufiksoj tiel:
liegikans e pöfikans [la riĉuloj kaj malriĉuloj]
gud [la bono] *gudikos* [la bona aspekto].

4.4. Gradoj de komparacioj (*greds pluamas*)
De la pozitiva formo (*fümafom*) oni formas
la ekvativon (*leigamafom*) antaŭ substantivo per *so –ik* kun *äs*:
so yunik äs ob [tiel juna, kiel mi]: .
kaj antaŭ verbo per *so –ik (äsä)*
so yunik äsä jinom [tiel juna, kiel li ŝajnas];
la komparativon (*pluamafom*) antaŭ substantivo per *–ikum* kun *ka*
yunikum ka ob [pli juna ol mi]
kaj antaŭ verbo per *–ikum* kun *kas*
yunikum kas jinom [pli juna ol li ŝajnas].
La superlativon (*muamafom*) per *–ikün* kun *–a*:
binom yunikün manas [li estas la plej juna el la viroj]

La formo *–ün* ankaŭ signifas ‘tre’ aŭ ‘-ega’, aŭ, kune kun la adverbo, *mu* ‘treege’:
vomül jönikün [belega fraŭlino]
vomül mu jönikün = treege bela fraŭlino.

A.5. NUMERALOJ (*Nums*)

5.1. Bazaj numeraloj (*Numavöds*)

0	*ser*		10	*deg*		$^{1}/_{10} = 0{,}1$	*dim= degdil bal*
1	*bal*		100	*tum*		$^{1}/_{100} = 0{,}01$	*zim= tumdil bal*
2	*tel*		1.000	*mil*		$^{1}/_{1\,000} = 0{,}001$	*mim= mildil bal*
3	*kil*		10.000	*degmil*		$^{1}/_{10\,000} = 0{,}000\,1$	*dimmim= degmildil*
4	*fol*		100.000	*tummil*		$^{1}/_{100\,000} = 0{,}000\,01$	*zimmim= tummildil*
5	*lul*		1.000.000	*balion*		$^{1}/_{1\,000\,000} = 0{,}000\,001$	*balyim= baliondil*
6	*mäl*		10^{9}	*milbalion*		$^{1}/_{10^{12}} = 0{,}000\,001^{2}$	*telyim= teliondil bal*
7	*vel*		10^{12}	*telion*		$^{1}/_{10^{18}} = 0{,}000\,001^{3}$	*kilyim= kiliondil bal*
8	*jöl*		10^{18}	*kilion*		k.t.p.	e.r.
9	*zül*					Alivorte ekz. 0,1	*ser liunül bal*

11 *degbal* 22 teldegtel 333 kiltum kildeg kil
7.654.321 *velbalion mältumluldegfolmil kiltumteldegbal*

½ *teldil = laf* ¾ *foldils kil* $^{5}/_{1\,000}$ *lulmim*
$^{3}/_{10} = 0{,}3$ *degdils kil = kildim = ser liunül kil*

La numeraloj sekvas la substantivon, ekz.
bim bal [unu arbo], *böds degtel* [dek du birdoj]

Oni povas uzi la numeralojn, kiel substantivojn, ekz.
logob tumis [mi vidas centojn]; *balan äseadom* [unu homo sidis].

5.2. Aritmetiko (*kalkulav*]

\+ *sa* $3 + 5 = 8$ *kil sa lul binos jöl;* *– nä* $8 - 3 = 5$ *jöl nä kil binos/retos lul*
× *-na* $3 \times 6 = 18$ *kilna mäl binos degjöl*
÷ *mü* aŭ *padilöl me* $18 \div 3 = 6$ *degjöl mü kil binos mäl.*
x^{n} *naät* $4^{2} = 16$ *naät telik fola = fol ad naät telik … binos degmäl*
√ radig $\sqrt[3]{8} = 2$ *radig kilik jöla = radig kilik se jöl …binos tel*

5.3. Ordaj kiaj aliaj numeraloj (*numavöds sökaleodik*)

-id [-a]	*balid* [unua]	*telid* [dua]	&c.
-ido [-e]	*balido* [unue]	*telido* [due]	&c.
-ik [-obla]	*kilik* [triobla]	*mälik* [sesobla]	&c.
-iko [-oble]	*kiliko* [trioble]	*mäliko* [sesoble]	&c.
-ön [-obligi]	*telön* [duobligi]	*kilön* [triobligi]	&c.
-ot [oblo]	*telot* [duoblo]	*kilot* [trioblo]	&c.
-at [-o]	*balat* [unuo]	*telat* [duo]	&c.
-am [-igo]	*balam* [unuigo]	*telam* [duigo]	&c.
-na [-foje]	*balna* [unufoje]	*telna* [dufoje]	&c.
-idnaed [la –a fojo]	*balidnaed* [la 1ª fojo]	*telidnaed* [la 2ª fojo]	&c.
-o [sinsekve]	*balo* [en unu ago]	*kilo* [duope, kiel duo]	&c.
a … [por ĉiu]	*a bal* [por ĉiu unu]	*a tel* [por ĉiuj du]	&c.
a –id [por ĉiu –a]	*a balid* [por ĉiu unua]	*a telid* [por ĉiu dua]	&c.

5.4. Datoj (*däts*)
31.3.1879 = *1879 mäzula* d. 31id = *balmil jöltumveldegzül, mäzula del kildegbalid.*
del kinid binos-li? [kiun daton ni havas?]

5.5. Horoj (*düps*) ekzemple

binos düp mälid göda	estas la sesa matene
binos düp tel e laf poszedelo	estas la 2a kaj ½ posttagmeze
binos düpalaf pos lul	estas la 5a kaj ½
binos foldil bü düp mälid	estas la ¼ antaŭ la 6a
binos minuts deg pos düp degbalid	estas 11:10
tü düp lul minuts foldegbal	je 5:41
düp kinid binos-li	kioma horo estas

5.5. Aĝo (*bäldot*)

lifayelis liomödik labol-li?	kiom da jaroj vi havas?
Labob bäldoti yelas foldeg	mi havas aĝon de 40 jaroj.

A.6. PRONOMOJ (*Pönops*)

6.1. Pronomoj personaj (*pönops pösodik*)

	Singulara (*balnum*)	Plurala (*plunum*)
I	*ob* mi	*obs* ni
II normala	*ol* vi	*ols* vi
ĝentila (malofta)	*or* ci	*ors* vi
I/II (malofta)	*og* vi aŭ mi	*ogs* mi/ni aŭ vi
III vira	*om* li	*oms* ili
ina	*of* ŝi	*ofs* ili
konkreta	*on* ĝi	*ons* ili
abstrakta	*os ĝi*	….
nedifinita	*oy* oni	….
refleksiva	*ok* si	*oks* si
Reciproka	*od* una alian	*ods* unuj aliajn

6.2. Pronomoj posesivoj (*pönops dalabik*)

Aldonu adjektivan finaĵon, ekz:. *ob>obik* [mi > mia]; *ons>onsik* [ili > ilia]
aŭ genitivan frazon, ekz. *ob>oba* [mi >de mi]; *ons>onas* [ili > de ili]
Substantivojn oni formas jene: *glidis ole ed olikanes* [salutojn al vi kaj viaj]

6.3. Pronomoj demonstrativoj (*pönops jonik*)

et	tiu	*etos*	tio	*ot*	la sama
at	ĉi-tiu	*atos*	ĉi-tio	*it*	mem

6.4. Nefinitaj pronomoj (*pönops nefümik*)

ek	iu persono	*bos*	io	*ans*	kelkaj
nek	neniu persono	*nos*	nenio	*anik*	unudu
öm	kelko	*ömik*	kelka	*ömans*	kelkaj homoj
al	ĉiu (substantivo)	*alik*	ĉiu (adjektivo)	*alan*	ĉiu homo
som	tia aĵo	*somik*	tia	*soman*	tia homo

6.5. Demandaj pronomoj (*pönops säkik*)

vira	ina	konkreta	abstrakta		
kim	*kif*	*kin*	*kis*	¦	kiu? kio?
kimik	*kifik*	*kinik*	*kisik*	¦	kiu … (adj.)?
kimid	*kifid*	*kinid*	*kisid*	¦	kioma?

Demandvortoj ankaŭ estas formitaj per aldono de *lio* aŭ prefikso *ki-*. Ekz.

liofagotik?	kiom distanca?	*liofütürik*	kiom estonta?
liogretotik?	kiom granda?	*liofütüro?*	kiom estonte?
liomödotik?	kiom multa?	*liomödoto?*	kiom multe?
liomödotid?	la kioma?	*liomödotidna?*	kiomfoje?
liomafädo?	en kioma mezuro?	*liokodo? = kikodo?*	kial?

kiöp? kiu loko? *kiöpo?* je kie? *kiöpao?* el kie? *kiöpio?* *al kie?* *kien?*
kitopo? = kiplado? en kiu loko? *kitimo? = kiüpo?* kiam?

6.6. Eksklamaciaj pronomoj (*pönops vokädik*)

vira	ina	konkreta	abstrakta		
kiom!	*kiof!*	*kion!*	*kios!*	¦	kia!

kios äbinon benosüpot! kia estis la surprizo! *vom kiof!* kia virino!
kio äfredof! kiel ŝi ĝojis *kiogretik binon God!* kiom granda estas Dio!

6.7. Relativaj pronomoj (*pönops tefik*)

kel [kiu] *ut, kel* [tiu, kiu] Ĝi deklinaciiĝis kiel substantivo.
Por eviti miskomprenon, oni uzas viran/inan/abstraktan formon de *ut*:
hiut/jiut/utos, hikel/jikel/kelos
mot söla, hikeli elogob, binof jitidan
la patrino de la sinjoro, kiun (la sinjoron) mi vidis, (ŝi) estas instruistino.
kü [kiam] *uto, kü* [tiam, kiam] *uto, kö* [tie, kie]

A.7. ADVERBOJ (*Ladvärbs*)

7.1. Simplaj formoj [*vöds balugik*] (ekzemploj – rigardu en vortaro)

ai [ĉiam] *ba* [eble] *i* [ankaŭ] *igo* [eĉ] *is* [ĉi-tie] *no* [ne]
nu [nun] *plu* [plie] *mu* [pleje] *te* [nur] *zi* [ĉirkaŭe (loke)].

7.2. Kunmetitaj formoj (v*öds pakoboyümöl*)

Adverboj estas formitaj de aliaj vortoj (ekzemple substantivoj, adjektivoj, k.t.p.) per la sufikso *–o*, ekzemple

gudiko [bone] *jöniko* [bele]
delo [tage] *adelo* [hodiaŭ] *ädelo* [hieraŭ] *odelo* [morgaŭ]

Direkte venante estas formita per *–ao*, venante al per *–io, ekz.*

deto [dekstre] *detao* [de la dekstra] *detio* [dekstren]

7.3. Komparaciaj formoj (*pluamafoms e muamafoms*)

Estas formitaj, simile al adjektivoj, per la sufiksoj – *umo* kaj *–üno*, ekz.

gudiko [bone] *gudikumo* [pli bone] *gudiküno* [plej bone]
jöniko [bele] *jönikuno* [pli bele] *jöniküno* [plej bele]

A.8. PREPOZICIOJ (*Präpods*)

8.1. Simplaj formoj (*vöds balugik*) (ekzemploj – rigardu aliajn en vortaro)
de [de] *in* [en] *ini* [en –on] *nen* [sen] *fa* [fare de]
sus [sur] *bevü* [inter] *ko* [kun] *lä* [ĉe, apud] *ad* [al]

8.2. Kunmetitaj formoj (v*öds pakoboyumöl*)
Prepozicioj estas formitaj de aliaj radikoj per la aldonado de la sufikso *–ü*, ekz.
danü [dank' al] *demü* [konsidere al] *kodü* [kaŭze de] *domü ob* [ĉe mi]
nemü reg [en la nomo de la reĝo] *pötü* [okaze de] *gudü* [pro la bono de]
Post prepozicioj la substantivo staras en nominativo.

A.9. KONJUNKCIOJ (*Konyuns*)

9.1. Simplaj formoj (v*öds balugik*) (ekzemploj – rigardu aliajn en vortaro)
e (antaŭ vokaloj *ed*) [kaj] *u* (antaŭ vokaloj *ud*) [aŭ] *dat* [por ke]
e … e [kaj … kaj] *do* [kvankam] *ab* [sed] *bi* [ĉar] *ven* [kiam]

9.2. Kunmetitaj formoj (*Vöds pakoboyumöl*]
Konjunkcioj estas formitaj de aliaj readikoj pere de la sufikso *–ä*, ekz.:
Büä [antaŭ ol] *güä* [sed, kontraŭe] *toä* [spite ke]
äsä [kiel, sammaniere kiel] *asä* [en la rolo de] *kodä* [pro tio, ke = tial, ke]

A.10. INTERJEKCIOJ (*Linteleks*)

10.1. Simplaj formoj (*vöds balugik*) (ekzemploj – rigardu en vortaro)
ag! [ah!] *vi!* [ve!] *adyö!* [adiaŭ!] s*i!* [jes!] *nö!* [ne!]

10.2. Kunmetitaj formoj (*vöds pakoboyumöl*)
Lesi! [certe jes!] *Lenö!* [certe ne!]
Kaj eblas fari interjekciojn pere de la finaĵo *–ö*, ekz.:
stopö! [haltu!] *danö!* [dankon!]

10.3. Salutoj (*glids*)
Samkiel en Esperanto, salutoj uzas la akuzativon, ekz.:
Deli gudik! [Bonan tagon!] *Dani ladöfik!* [Koran dankon!]

A.11. VERBOJ (*Värbs*)

11.1. Personoj de la verbo (*pösods värba*)

Verboj konjugaciiĝas per la sufiksigo de la persona pronomo al la fino de la radiko de la verbo, ekzemple, de *vokön* kaj *reinön*:

vokob	*vokol*	*vokom*	*vokof*	*vokon*	*reinos*
mi vokas	vi/ci vokas	li vokas	ŝi vokas	ĝi vokas	pluvas
vokobs	*vokols*	*vokoms*	*vokofs*	*vokons*	*vokoy*
ni vokas	vi vokas	ili vokas	ili vokas	ili vokas	omi vokas

11.2. Tempoj de aktiva voĉo (*timafoms dunalefoma*)

Ĉiuj tempoj estas formitaj per la prefiksigo de vokaloj jene:

	Imperfekta (*nefinik*]	Perfekta (*finik*]
Prezenco (*presenatim*]	*vokob* mi vokas	*evokob* mi estas vokinta
Preterito (*pasetatim*]	*ävokol* vi/ci vokas	*ivokom* li estis vokinte
Futuro (*fütüratim*)	*ovokof* ŝi vokos	*uvokobs* ni estos vokinta
Futuro en pasinteco (*pasetofütüratim*]	*övokols* vi estis vokontaj	*üvokoy* oni estis estonta vokinta

11.3 Modoj (*bidirs*)

La verboj havas la jenajn sufiksojn al la radiko aŭ la tempo:

Infinitiva (*nefümabidir*]	*-ön*	*vokön* [voki]	*ovokön* [esti vokonta]
Participoj (*partisips*]	*-öl*	*voköl* [vokanta]	*evoköl* [vokkinta]
Imperativa (*büdabidir*]	*-öd*	*vokolöd* [voku]	*vokolsöd* [voku]
Optativa (*vipabidir*]	*-ös*	*vokolös* [b.v. voku]	*vokolsös* [b.v. voku]
Kondicionalo (*stipabidir*]	*-öv*	*vokolöv* [vi vokus]	*evokolös* [vi estus vokinta]

11.4. Pasiva voĉo (*sufalefom*)

Prefikigu *p-* (en la presenco *pa-*)

pavokön [esti vokita] *pavokob* [mi estas vokita] *pavoköl* [vokita]
povokofs [ili (inaj) estos vokitaj] *pövokoy* [ke oni estu estinta vokonta]

11.5. Demandoj (*säks*)

Sufiksigu la neakcentitan partikulon *–li* al la plej grava vorto. Komparu kun ‘ĉu?’

ovokobs-li [ĉu ni vokos] *baicedol, no-li?* [vi kunsentas, ne?]
Buki kinik labol-li? Rediki-li u vieliki-li?
[Kiun libron vi havas? La ruĝan aŭ la blankan?]

11.6. Konjunktivo (*mögastad*)

Por manko de certeco, dubeco aŭ ebleco, aldonu neakcentita *–la*

no sevob, va okömon-la [mi ne scias ĉu li venos (sed mi dubas)]
äcedob-la, das ekömom [mi povus esti kredinta, ke li venis]

11.7. Negacio (*noam*)
no antaŭ la neigota vorto, ekz. *no ävokob* [mi ne vokis]; *no ob vokob* [ne mi vokas]

11.8 Daŭraj tempoj (*timafoms dulik*)
Por substreki la daŭron de verbo, uzu *jäfön me … -am* [sin okupi pri] aŭ *…ad –ön*:
jäfob me logam jipula [mi min okupis pri la vidado de la knabino]
jäfob ad logön jipuli [mi estas vidante knabinon]

11.9. Nerekta parolo (*spik panunöl*)
äsagom, das öpenom [li diris, ke li skribos]
ma lesag oma, ödunom ädelo atosi [laŭ lia aserto, li estis faronta tion hieraŭ]

A.12. VOLAPUKO KAJ ESPERANTO
(*Volapük e Sperantapük*)

Jen kelkaj koincidoj kaj similecoj inter Volapuko kaj Esperanto

La principo de vortfarado.
La principo de afiksoj kaj ĝiaj multaj uzoj.
Komoj antaŭ relativaj frazeroj, kies pronomo kunhavas plej ofte ĝian korelativon.
Salutoj bezonas akuzativon, ekz. *deli gudik* [bonan *tagon*].
Demandoj sin formas per aldono de vorteto, ne per la vortordo, *-li* [ĉu].
Prepozicioj havas nominativon, ne oblikvan kazon, kiel en naciaj lingvoj.
Pronomoj posesivaj sin formas per pronomo + sufikso de adjektivo.
Similecetoj de vortoj neordinaraj kaj afiksoj en formo aŭ uzo, ekz.
-ük- = -ig- (*-ükön* = -igi); *-ik-* = -iĝ- (*-ikön* = -iĝi);
-an = -an(o) *-o, -ö, -ü* = -aŭ ofte *o-* = -o- estonteco; *i-* = -i- pasinteco
lazür = lazuro, kaj aliaj vortoj kun antaŭvokala ‘l’.
La *ŝlosiloj* de Esperanto kaj la mallongaj gramatikoj de Volapuko.

Onidire Zamenhof anoncis, ke, se li scius antaŭe pri Volapuko, li neniam estus elpensinta Esperanton.

B.1. PREFIKSOJ (*foyümots*]

al-	ĉiu-	*aldelik* [ĉiutaga]
be-	rilatas radikon rekte al ricevanto	*golob su veg* = *begolob veg* [mi iras sur vojo] *givön* / *begivön* [doni / doti] *beplanob gadi* [mi plantas ĝardenon]
da-	kompletigas radikon	*binön* [esti] / *dabinön* [ekzisti] *tuvön* [trovi] / *datuvön* [inventi] *lestüm* [estimo] / *dalestüm* [respektego]
dä-	en pecojn	*däbreikön* [rompi en pecojn]
de-	de-, for-, el-	*detirön* [eltiri]
dei-	ĝis morto	*deibludön* [sangi ĝismorte]
do-	malsupren	*dacöpön* [malsuprenhaki]
fa-	for-	*fabinön* [foresti]
fäi-	ferme	*fäilökön* [enŝlosi]
fe-	tuta konsumo	*fepledön* [forludi (monon)]
fea-	alilokigen	*feapladön* [formovi]
fi-	ĝisfine	*fimekön* [fari ĝis la fino]
ge-	re-	*gegivön (bosi eke)* [redoni (ion al iu)]
hi-	vira	*himatan* [edzo]
ho-	senseksigita viro	*hojevod* [kastrita ĉevalo]
ji-	ina	*jimatan* [edzino]
jo-	sensekigita ino	*jogok* [kastrita kokino]
ke-	kun	*kelied* [kun-sufero = kompato]
ki-	ki-? / kiu?	*kikodo?* [kiukaŭze? = kial?]
la-	supren	*lasumön* [levi]
lai-	daŭra	*laispikön* [daŭre paroli]
läx-	eks-	*läxprofäsoran* [eksprofesoro]
le-	-eg-	*ledom* [palaco] *lefat* [avo]
lu-	-aĉ-, duon-	*ludom* [domaĉo] *lufat* [duonpatro]
lü-	bo-	*lüfat* [bopatro]
mai-	malfermi	*maibrekön* [malferme rompiĝi] *maibreikön* [malferme rompi]
mi-	aĉa, mal-, fi-	*mikonfid* [malfido] *mikeb* [herbaĉo]
mil-	kilo-	*milmet* [kilometro]
ne-	mal-	*neflen* [malamiko]
ni-	ena	*niklot* [subvesto]
nü-	enen	*nübladön* [enblovi]
plö-	ekstera	*plögun* [ekstera vesto = palto]
po	post- (loka), malantaŭ	*poyumot* [sufikso] *popenäd* [P.S.]
pos-	post- (tempa), malantaŭ	*posson* [nepo] *posdaut* [nepino] *poscil* [genepo] *poszedelo* [posttagmeze]
ru-	originala, antikva, pra-	*rutim* [pratempo, prahistorio]
sä-	foriga	*säkusad* [senakuzo, senkulpiĝo]
si-	stela, ĉiela	*sifits* [Fiŝoj (konstelacio)]; *sisfer* [ĉiela sfero]

N.B. Ĉi-tiu listo ellasas formojn el: verbaj tempoj, ekz, *a-,ä-,e-,i-,o-,ö-,u-,ü-, p-* ; substantivoj, ekz. *lafayel* [duonjaro]; prepozicioj, ekz. *bevünetik* [internacia]; Ĥemiaj prefiksoj (vidu *Gramat Volapüka ,* §165, p.50 kaj ĉapitron VI).

B.2. SUFIKSOJ (*poyümots*)

-a	genitiva kazo	*fata* [de la patro]
-ab	-indeco, -igeco	*hetab* [malamindeco]
-af	besto	*sugaf* [mambesto = sucĥbesto)]
-ag	havanta iom da	*herag* [hareco]
-ain	juvelo	*nobain* [nobelŝtono = gemo]
		diamain [diamanto tajlita]
-al	ĉef-	*general* [generalisimo]
-am	-ado	*penam* [skribado]
-an	-isto, -ano	*tidan* [instruisto], *slopan* [subtenanto]
-ao	venante de	*detao* [de dekstre], *seimao* [venante el ie]
-aö	fora interjekcio	*tabaö!* [for de la tablo!]
-as	genitiva plural	*fatas* [de la patroj]
-at	kvanto de, -ero	*degat* [deko]
-av	scienco	*kalkulav* [aritmetiko]
-ä	konjunkcio	*güä* [sed, male] ╓letero adresiĝas]
-äb	persono ricevanta/suferanta	*fanäb* [malliberulo], *beladetäb* [persono al kiu╙
-äd	generala konkretigo, -aĵo	*spikäd* [parolado], *bumäd* [konstruaĵo], *notäd* [publikaĵo], *magäd* [impreso], *jenäd* [okazaĵo]
-äl	de la menso	*tikäl* [menso], *senäl* [senso]
-äm	organo (de vivaĵo)	*logäm* [vida organo = okulo]
-än	-lando, -ujo, -io	*Linglän* [Anglujo], *nolüdän* [la nordo]
-ät	abstrakteco, -eco	*kompenät* [kompanio], *paostolät* [apostoleco]
-e	dativa kazo	*fate* [al la patro]
-ean	oceano	*Nolüdapovean* [Arkta Maro]
-eän	insulo	*Borneän* [Borneo]
-ed	konkretigo	*pened* [letero], *noted* [anonco]
-ef	aro de homoj	*menef* [homaro]
-el	faristo	*bodel* [panbakisto]
-em	aro de aĵoj	*bledem* [foliaro]
-ep	planto, -ujo	*bünep* [pirujo]
-er	enhavanta	*ferinerik* [enhavanta feron]
-es	dativa pluralo	*fates* [al la patroj]
-et	konkretiĝo, ĉirkonstanco	*jenot* [evento], penet [skribaĵo]
-i	akuzativo, -n,	*logob fati* [mi vidas (la) pastron]
-ian	maŝino, ilo aganta	*jonian* [montrilo]
-iäl	deziro	*nibiäl* [sukeraĵemo], *okiäl* [egoismo]
-iän	provinco	*Saxiän* [Saksa provinco]
-iär	-ujo	*nigiär* [inkujo]
-id	1. orda numeralo	*balid* [unua]
	2. por reversi ordon	*lotön* [loĝi] > *lotidön* [gastigi]
		gebön [uzi] > *gebidön* [disponiĝi]
		pönön [puni] > *pönidön* [suferi, pentofari]
-iel	maŝino aŭ ilo kiu faras	*peäniel* [pinglofarilo], *klufiel* [najlomaŝino]
-ik	adjektivo, -a	*gudik* [bona], *obik* [mia]
-ikam	-iĝado	*redikam* [ruĝiĝado]
-ikön	-iĝi	*bäldikön* [maljuniĝi], *primikön* [ĵus komenciĝi]
-il	-et, malgranda, -ĉj, -nj, dim.	*dogil* [hundeto, hundcĵo], *flapil* [frapeto]
-im	-ismo	*tikälim* [racionalismo]

-io	irante al, -en	*valöpio* [ĉien]
-ion	numeraloj $10^{6\times n}$	*telion* [$10^{6\times 2} = 10^{12}$ = 1 000 000 000 000]
-ir	gramatikaj vortoj	*fomir* [fleksio], *finahukir* [finkrampo]
-is	akuzativa pluralo, -ojn	*logob fatis* [mi vidas (la) patrojn]
- -la	dubeco en verbo	vidu gramatikon
- -li	demanda vortfino, ĉu	vidu gramatikon
-na	-foje	*balna* [iam, unufoje], *telna* [dufoje]
-o	adverbo	*gudiko* [bone], *deto* [dekstre]
-od	konkretiĝo	*magod* [bildo], *nulod* [novaĵo]
-oin	ŝtono	*diamoin* [diamanto (mineralo)]
-op	kontinento	*Yurop* [Eŭropo]
-os	abstrakteco de adjectivo	*gudikos* [bono, tio bona]
-ot	konkretiĝo (pli solida ol *–od*)	*magot* [statuo]
-ov	ebleco	*pronov* [prononcebleco]
-ö	interjekcio	*stopö!* [haltu!]
-öd	imperativo, -u	vidu gramatikon
-öf	-eco	*manöf* [vireco], *flenöf* [amikeco]
-öl	participo	vidu gramatikon
-öm	-ilo, aparato	*flitöm* [aviadilo], *logöm* [celilo]
-ön	infinitivo, -i	vidu gramatikon
-öp	loko	*potöp* [poŝtoficejo], *kiöpo* [kie, kiuloke]
-ös	optativa modo	vidu gramatikon
-öv	kondicionala modo	vidu gramatikon
-s	pluralo, -j	*fats* [patroj]
-uän	arĥipelago	*Filipuäns* [Filipinoj]
-ug	-indeco, -ebleco	*klotug* [vesta eleganteco], *plakug* [sperteco]
-ul	1. statŝanĝo	*pladul* [prostaro]
	2. monatoj	*febul* [februaro]
-um	komparativo, pli	*gudikum* [pli bona]
-ü	prepozicio	*pläamü* [excepte de]
-üd	1. muzika intervalo	*kilüd* [trito,intervalo inter 3 tonoj], *jolüd* [oktavo]
	2. geografia direkcio	*nolüd* [nordo], *vienüd* [venta/kompasa direkcio]
-üf	muzika noto	*kilüf* [medianto], *kliküf* [kleo]
-ükön	-igi	*redükön* [ruĝigi]
-ül	-et-, diminutivo	*flapül* [pulso]
	-id-, juna	*dogül* [hundido]
-üm	muzikaĵo	*balüm* [solo], *maleküm* [marŝo]
-ün	superlativo, plej	*gudikün* [plej bona]
-üp	tempo	*kiüpo* [kiam], *cunüp* [fasta tempo, Karesmo]
-yim	10^{-6n}, -ono	*balyim* milionono, *telyim* [bilionono]

N.B.
Ĉi-tiu listo ellasis ĥemiajn sufiksojn:
-at, -er, -et, -etilen, -i, -id, -il, -ilen, in, -it, -o, -öl, -ul, -ül.
Vidu *Gramat Volapüka*, § 201, p.55 kaj ĉapitron VI.

B.3. ĈEFAJ RADIKFORMAJ ADVERBOJ
(*Ladvärbs rigavödik veütikum*)

1. lokaj

ge	[reire, malantaŭen]	*is*	[ĉi-tie]	*zi*	[ie en la ĉirkaŭaĵoj]
kobo	[kune]	*isio*	[ĉi-tien]	*zo*	[ĉie en la ĉirkau'aĵo]
mo	[ire, foren]	*us*	[tie]	*zü*	[ĉirkaŭe (fikse)]
		usio	[tien]		

2. tempaj

ai	[ĉiam]	*neai*	[neniam]	*dönu*	[denove]
ebo	[precize, eĉ]	*föro*	[iam]	*neföro*	[neniam]
nog	[ankoraŭ]	*nu*	[nun]	*anu*	[en ĉi-tiu momento]
enu	[antaŭnelonge]	*nü*	[jen, nu]	*nü … tän*	[jen … jen]
tän	[tiam]	*pas*	[ne ĝis, nur]	*ya*	[jam]
		ze	[meze]		

3. manieroj

bis	[nur se, nur kiam, sed nur]	*go*	[tre]	*igo*	[eĉ]
lö	[rekte]	*so*	[tiele]	*ye*	[tamen]

4. kvantaj

i	[ankaŭ]	*läs*	[malplie]	*mu*	[pleje]
so	[tiom]	*plu*	[plie]	*neplu*	[malplie]
te	[nur]	*ti*	[preskaŭ]	*tu*	[tro]
		zi	[ĉirkaŭe, en la ĉirkaŭaĵo]		

5. jesaj, neaj, dubaj

ba	[eble]	*bo*	[almenaŭ, eme]	*ga*	[tutcerte]
no	[ne]	*vo*	[vere]	*zu*	[ankaŭ, plue]

6. demandaj

Vidu gramatikon § 6.5 pri vortoj komenciĝantaj per *ki-* kaj *lio-*

lio	[kiel/kiom]

B.4. ĈEFAJ RADIKFORMAJ PREPOZICIOJ

(Präpods rigavödik veütikum)

a po (pezoj kaj mezuroj)
ad por, al, en la direkto de
as kiel, kvazaŭ, anstataŭ: *lord peklotom as liegikan* [lordo sin vestis kiel (devas) riĉulo (kiu li estis)]

äl ĉe: *äl süt* [en la strato]
äs kiel, ĉar la subjekto estas …: *lord peklotom äs dünan* [la lordo sin vestis, kiel servisto (kiu li ne estis)]

bai laŭ, konforme al
bei preter
bevü inter (pluraj)
bis depende de, kondiĉe de
bu antaŭ (antaŭrajte)
bü antaŭ (tempe)

da tra
de de, el
dis sub
dö rilate al, pri
dub kaŭze de, per, fare de (medio)
dü dum

fa fare de (la aganto)
fo antaŭ (loke)

gü kontraŭ

in en
ini en –n (direkto)

ko kun
kol -a rilate al, kun: *flenöfik kol …* [amike kun …]

lä sur, laŭ, je, en, kun
len sur, per, laŭ
love super
lö vertikale
lü al

ma pri, (flari) de, (nomi) laŭ, laŭ la scio de
me per
mo for
mö je la sumo de

nä minus (matematike)
näi flanke al
nen sen

ön en, sub: *ön nem foginik* [en fremda nomo] *ön kodül* [sub la preteksto]

pla anstataŭ
plä krom
po post (loko)
pos post (tempo)
pö per, pere de, pro
pro por, cele al, je la bono de, serĉe de, ŝanĝi de

sa inkluzive, plus (matematiko)
se el
sis de, depost (tempo)
su sur
sui sur –on (direkto)
sus super
sü de el

ta kontraŭ
ti preskaŭ
to spite de
tö en (loke), loĝe en, lokige
tü je (horo, tempo)
tüi preskaŭ je (horo, tempo)

ün en (tempo)
ünü en la daŭro de (tempo)

ve laŭlonge de (spaco)
vü enmeze de, inter du

za proksimume (abstrakte)
ze preskaŭ (abstrakte)
zi ie en la ĉirkaŭaĵo de
zü ĉirkaŭirante al (fikse) (loke)
züi ĉirkaŭiranten (almove)

B.5. ĈEFAJ RADIKFORMAJ KONJUNKCIOJ (*Konyuns rigavödik veütikum)*

ab sed

adas por ke, je la fino ke, cele ke

ä/äd kaj (rilate al samaj)
Victoria, jireg ä jilampör [V. reĝino kaj imperiistrino]

äsä kiel, sammaniere kiel, en la rolo de, kiel + verbo
kälobs Volapüka, äsä kälobs latini [ni prizorgas Volapukon, kiel ni prizorgas la latinan]

bi ĉar

bisä se nur

das ke

dat por ke, tiel ke –u, intence ke

do kvankam

du dum

e/ed kaj

efe kaj tio, kaj tia, kaj certe
binof jidanüdan efe jönik [ŝi estas dancistino, kaj tio bela]

i/id ankaŭ

ibä pro tio, ke

if se

ifi eĉ se

jüs ĝis

ka ol (post komparativo)

klu pro tio, ke; kiel konsekvenco de tio, ke

nendas se … ne; krom se

ni nek

nü nun; *nü … tän* [jen …jen]

pläs krom tio, ke

sodas tiel, ke

sosus en la momento, kiam

u/ud aŭ

ü/üd aŭ (rilate al la sama) *hipal ü fat* [patro aŭ patro]

üf okaze, ke; por gardi kontraŭ la ebleco, ke

va ĉu (subjunkcia)
u va … u va [ĉu … ĉu]

ven kiam

ye tamen

e(d) … e(d)	kaj … kaj
u(d) … u(d)	aŭ … aŭ
ni … ni	nek … nek
noe…abi	ne sole … sed ankaŭ
no te … abi	ne sole ... sed ankaŭ
nü … tän	jen … jen
plü … plü	ju pli … es pli

---ooo000ooo---

B.6. ĈEFAJ RADIKFORMAJ INTERJEKCIOJ (*Lintelelks rigavödik veütikum*)

adyö adiaŭ

ag ve

bö sensencaĵo

ekö jen

fi fi

fö for

gö forte

ha ha

he he

hö *hop*

maj marŝu

nö ne

o ho

ö vere

rö subitege

si jes

sö atentu

vi ve

vö vere

yö hura

zö sensencaĵo

!!!

KELKAJ VORTGRUPOJ
(*Vödagrups ömik*)

TAGOJ (*dels*) (*-del*)

sudel	dimanĉo
mudel	lundo
tudel	mardo
vedel	merkredo
dödel	ĵaŭdo
fridel	vendredo
zädel	sabato

MONATOJ (*muls*) (*-ul*)

1.	*yanul*	*7.*	*yulul*
2.	*febul*	*8.*	*gustul*
3.	*mäzul*	*9.*	*setul*
4.	*prilul*	*10.*	*tobul*
5.	*mayul*	*11.*	*novul*
6.	*yunul*	*12.*	*dekul*

SEZONOJ
(*säsuns*) (*-üp*)

florüp	printempo (flor-)
hitüp	somero (varm-)
fluküp	aŭtumno (frukt-)
nifüp	vintro (neĝ-)

KOMPASPUNKTOJ
(*vienüds*) (*-üd)*

nolüd (n.)	nordo
lofüd (l.)	oriento
sulüd (s.)	sudo
vesüd (v.)	occidento

KONTINENTOJ
(*kontinäns*) (*-op*)

Yurop	Eŭropo
Siyop	Azio
Frikop	Afriko
Merop	Ameriko
Stralop	Aŭstralazio

KARTEMBLEMOJ
(*klurasots*)

♠	*pik*
♣	*trif*
♥	*kör*
♦	*kar*

LUDKARTOJ
(*pledakadasots*)

man	fanto
vom	damo
reg	reĝo
had	aso

ekz. *karakil* = ♦3

ĈIELARKO
(*reinabo*b)

red	ruĝo
rojan	oranĝo
yelov	flavo
grün	verdo
blöv	bluo
lindigot	indigo
violät	violo
viet	blanko
bläg	nigro

ZODIAKO
(*Zodiak*) (*si-)*

Sihijip	Ŝafo
Sitor	Taŭro
Siteläd	Ĝemeloj
Sikref	Kankro
Sileon	Leono
Sivirgan	Virgulino
Sivätöm	Pesilo
Siskorpion	Skorpio
Sisagitan	Sagitario
Sikapar	Kaprikorno
Sivatan	Amforo
Sifits	Fiŝoj

MUZIKNOTOJ
(*musiganoats*) .

‖O‖	*noat lölik telik*	duobla plena noto
O	*noat lölik*	plena noto
○|	*noat teldilik*	duona noto
•|	*noat foldilik*	kvarona noto
♪	*noat jöldilik*	okona noto
	&c. &c,	&c,

ŜAKVORTOJ (*cögavöds*)

hireg	reĝo
jireg	reĝino
nunan	kuriero
jevod	ĉevalo
tüm	turo
pion	peono
cögö!	ŝak(on)!
lecögö!	ŝakmat!
rokadön	aroki

KELKAJ MALLONGIGOJ

(*Brefods ömik*)

a.s.	*as sam* [ekz.]	*l.*	*logolös!*	*pl.*	*plunum*
baln.	*balnum*	*ladv.*	*ladvärb*	*pr.*	*präpod*
bev.	*bevünetik*	*lad.*	*ladyek*	*prot.*	*protästik*
br.	*brefod*	*lart.*	*lartig*	*r.*	*reidolös!*
d.	*del* [tago]	*lat.*	*latin*	*rom.*	*romakatulik*
	din	*lov.*	*loveädik*	*Rus.*	*Rusänapük*
D.	*Deutänapük*	*Lap.*	*Lapänapük*	*sek.*	*sekidik*
dem.	*demodik*	*Lin.*	*Linglänapük*	*st.*	*steläd*
e.r. =	*e ret(s)* [k.t.p.]	*Lit.*	*Litalyänapük*	*S.B.V.*	*Sog Bevünetik*
füs.	*füsüd*	*m.*	*manik*		*Volapüka*
Flan.	*Flanänapük*	*mat.*	*matemat*	*Sp.*	*Spanyänapük*
Fr.	*Fransänapük*	*mil.*	*milit*	*t.*	*tonat*
gad.	*gadav*	*mit.*	*miteodav*	*v.*	*vomik*
gen.	*genitif*	*mus.*	*musig*	*vok.*	*vokatif*
geom.	*geomet*	*n.*	*neudik*	*Vp.*	*Volapük*
git.	*gitäd*	*nel.*	*neloveädik*	*Vpan.*	*Volapükan*
gr.	*gramat*	*nev.*	*nevoiko*	*Vpanef.*	*Volapükanef*
k.	*konäd*	*nt.*	*noet*	*Vpik.*	*Volapükik*
kiem.	*kiemav*	*Ned.*	*Nedänapük*	*V.Gr.*	*Vöna-*
kony.	*konyun*	*p.*	*pösod*		*Grikänapük*
kus.	*kusatif*	*pd.*	*pad*	*V.V.*	*Vög Volapüka*

La pligranda parto de ĉi-iu listo estas en la *Gramat* kaj *Vödabuk* de Arie de Jong.